

*Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj
klubanoj kaj amikoj!***Kluba Programo:****januaro:**

- 6 Neniu kunveno
- 13 Novjara Festo (Dioramo)
- 20 Literatura Vespero (Ibis)
- 27 John Wells – *Lingva Seminario* (Dioramo)
(1800h: konsilantaro)

februaro:

- 3 Literatura Vespero (Ibis)
- 10 Terry Page – *El la Maniko de nia Libroretaro*
(Dioramo)
(1800h: konsilantaro)
- 17 Krucvortenigmoj (Ibis)
- 24 Renato Corsetti – *Pioniroj de Esperanto*
(Dioramo)

marto:

- 3 Diskut-vespero (aktualaĵoj) (Ibis)

Esperanta Kalendaro:

19-21 majo 2017: Brita kaj Skota Kunkongreso,
Edinburgo. <http://britakongreso.org>.
22-29 julio 2017: Universala Kongreso de Esperanto,
Seulo, Sud-Koreio. www.uea.org/kongresoj

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 17a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



Antoni Grabowski (1857-1921) – instiginto (kun LLZ) de la unua konversacio en Esperanto
“Pioniroj de Esperanto” Renato Corsetti 24 februaro

Jam dum sia universitata tempo Antoni Grabowski evoluigis profundan interesigon pri literaturo. Li estis membro de la Literatura Slava Societo (Towarzystwo Literacko-Słowiańskie) en Vroclavo. Sed Grabowski entuziasmiĝis ne nur pri la polaj lingvo kaj literaturo; iom post iom li lernas 9 fremdajn lingvojn kaj aldone li regos minimume 15 pasive. Antaŭ tiu fono ne mirigas, ke la studento Grabowski interesiĝas ankaŭ pri la ideo de lingvo internacia. En la jaro 1887 li aĉetis kaj trastudis la freŝe aperintan libreton "Dr-o Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro", en kiu L. L. Zamenhof prezentas sian lingvoprojekton, kiu baldaŭ konatiĝos sub la nomo "Esperanto". Forte impresita de ties travidebla strukturo kaj surprize rapide akirebla esprimkapablo li vojaĝis al Varsovio kaj vizitis Zamenhof-on; en tiu tago okazis inter ili la unua buŝa dialogo en Esperanto.

(adapto el Vikipedio)

La prelego tamen pritraktos ne nur la pionirojn sed ankaŭ la malpionirojn, alivorte homojn kun mala interna ideo rilate al Esperanto. Temas pri malpioniraj ideoj dum la komenco de Esperanto kaj nuntempe. Krome ĉar ni ĉiuj estas iusence malpioniroj de Esperanto, indas ankaŭ kompari nin kun la tiamaj pioniroj por vidi kiel ni ŝanĝiĝis.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);

Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West
Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779
yarrump@gmail.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

La jaro 2016 estis bona por La
Londona Esperanto-Klubo.
Viglaĵo estis ties kunvenoj, ĉe kaj
Diorama kaj Ibis. La iom
lastatempa Komuna Manĝo en la
Civito ankaŭ sukcesis.

LEKanoj progresis parole,
lernis ludojn, aŭskultis diverstemajn prelegojn kaj bonvenigis
gastojn el multaj landoj.

Pri tiu lasta afero, mi diru parenteze, ke mi mem amuze eraris
pri la origino de vizitanta amparo da samideanoj al la Hotelo.
Mi ial tuj sed malprave certis, ke la du junuloj estis iaj ĝermanoj
(pro ĉe mi perceptitaj manieroj je gestado, vestado ktp);
kvankam ili ambaŭ estis tute britaj! Jen la eterne surprizebla
vivo en Esperantujo. Mi do plie kaj plue akriĝu miajn antenojn.

Ree al 2016, mi rakontu iom pli, pri la vesperoj ĉe Ibis. Multe
pli da homoj ĉeestis tra la jaro, ol iuj atendis. Cetere, okazis
ne nur babilado, sed literaturaj diskutoj, voĉlegoj de teatraj kaj
poeziaj verkoj, gramatikaj ekzercoj kaj eĉ instruado al komen-
cantoj. Kaj en Diorama, oni ĝuis buntajn kaj informplenajn
prezentojn, pri multege da aferoj. Je la Zamenhofa Vespero,
eĉ prezentiĝis teatraĵo!

Amikecoj kaj plumamikecoj komenciĝis, danke al LEK-
renkontiĝoj; novaj personaj interesoj kaj hobiaj same leviĝis;
artikoloj kaj verkoj naskiĝis. La individuaj niveloj de praktikado
je Esperanto plialtiĝis; lernantoj gajnis atestilojn post
ekzamenoj; novaj vizaĝoj membriĝis kaj konstante partoprenis
semajnon post semajno.

Post tiom da bono en 2016, ni ĝuste tial eniru 2017 kun
granda espero kaj eĉ pli granda memfido!

Feliĉan Novjaron,

David Thornell

Nia Novjara Festo ...

... okazos en la 13a de januaro. Oni dume babilos, konkursos,
manĝos, trinkos, kaj LEKano devos pagi por tio – neniom ajn! (Se tio
ĝenus vian konsciencon, vi tamen povus surloke iom donaci al la
kluba kaso). Por ke la provizo de konsumaĵoj ĝuste sufiĉu, sed ne
estu troa, bonvolu informi al anica@btinternet.com se ŝajnas al vi, ke
via intenco ĉeesti (aŭ ne ĉeesti!) ial surprizos la organizantojn.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo
Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Anna Lowenstein, Antony Rawlinson
(Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

